# STARTO

ORGANO DE ĈEHA ESPERANTO-ASOCIO 1976 4,5(55,56)

● nova pacalvoko ● fundamento por nia agado - Lapenna kaj ĈES ● MEM ● inter konscio kaj konsciigado ● mia plej kara rememoro ● fervojistoj ● K. Píč ● la kulo ● informoj ● Poděbrady

INFANOJ, PACO KAJ ARTO — ДЕТИ, МИР И ИСКУССТВО

CHILDREN, PEACE AND ART — DĚTI, MÍR A UMĚNÍ



LES ENFANTS, LA PAIX ET LES ARTS

KINDER, FRIEDEN UND KUNST — los NIÑOS, la PAZ y el ARTE

# NOVA PACALVOKO EL STOKHOLMO



La venko de la pacafero kaj la malstreĉiĝo elvokis novan internacian atmosferon,novaj esperojn, novan fidon kaj novan optimismon inter la nacioj.La paco estas defendebla. La mondo de paco estas konstruebla.La unueco de la pacfortoj kapablas por ĉiam venki la obstaklojn, kiuj baras la vojon al finkonstruo de la nova mondo, de la mondo sen agreso, ekspluatado, subpremo,malsato kaj mizero. La plej gravan obstaklon por la strebado de nekonvertebla malstreĉiĝo prezentas la febra armigado.La febra armigado ankoraŭ minacas al nia planedo per nuklea katastrofo. En la malstreĉiĝa procedo tiu ĉi danĝero ja cedas, sed la armiga konkurado malcertigas la malstreĉiĝon kaj rekte endanĝerigas ĝin.En multaj landoj,kie senĉese plialtiĝas la vivokostoj, kreskas inflacio kaj ekonomiaj krizoj kaj la febra armigado forte ĝenas vastan homamason. Ĝi rabas rimarkindan parton de landriĉaĵoj kaj de la nacia. Enspezo la malstreĉiĝo donas novajn eblecojn por la venko en la batalo por la nova internacia ekonomia sistemo, por la rajtoj de la nacioj disponi per siaj propraj naturaj riĉaĵoj.Ĝi estas armilo en la batalo por finigo de la rabado flanke de la monopoloj kaj multnaciaj kompanioj. La febra armigado kaj amasigo de armiloj en la manoj de imperiistoj kuraĝigas la politikon de la agresemo, militismo, koloniismo kaj rasismo. La malstreĉiĝo estas la baza faktoro por plifortigo de la strebado por nacia sendependeco, justeco kaj socia progreso en ĉiuj landoj. La malstreĉiĝo kreas novajn eblecojn por solvo de la plej necesaj nuntempaj internaciaj problemoj, por la forigo de streĉaj kaj konfliktaj punktoj. La ĉesigo de la febra armigado ebligus la vojon al la grandaj celoj de la homaro: al la malpermeso de la nukleaj kaj amasmortigaj armiloj, al la ĝenerala senarmigo -al la mondo sen armiloj. La monda publiko havas pli grandan respondecon kaj estas pli forta ol kiam ajn pli frue. Ĝi kapablas malsukcesigi la militinstigantojn kaj la fortojn de malvarma milito, la malamikojn de la homaro.

Monda Packonsilantaro alvokas ĉiujn registarojn, kaj parlamentoj, ĉiujn pac- kaj amasmovadojn,, ĉiujn politikajn partiojn, sindikatojn, virin- kaj junularorganizojn, religiajn,sociajn kaj kulturorganizojn, kiuj strebas por la homarprogreso, unuiĝi en la nova tutmonda ofensivo kontraŭ la armigado.

Ĉesigi la febran armigadon - por fari la malstreĉiĝon nekonvertebla ! La febran armigadon - por frua efektivigo de la nova internacia ekonomia sistemo ! Ĉesigi la febran armigadon -por defendi la pacon kaj krei la novan mondon! -Komune batalu - por la malpermeso de ĉiuj nukleaj kaj aliaj amasdetruaj armiloj! Komune batalu - por ĝenerala kaj tutmonda senarmigo! -Komune batalu-por la baldaŭa kunvoko de la tutmonda konferenco por senarmigo !



# FUNDAMENTO POR NIA AGADO

### Kelke da rimarkigoj pri la evoluo en kaj ester ĈEA

En la pasinta jaro Ĉeĥa Esperanto - Asocio kaj ties organoj realigis principajn decidojn por la plua periodo de la asocia ekzistado.Sen troigo mi povas diri, ke ĝi estis laŭ historia vidpunkto pli signifoplena etapo por la Esperanto-movado en la ĉeĥaj landoj ol oni dume konscias.

Depost 1968-9, kiam fondiĝis nia asocia - kvankam ne kiel sekvo de la tiutempa okazado - aperis sufiĉe da mankoj kaj problemoj, kaŭze de kiuj la tutasocia kongreso estis dufoje prokrastita. La mankoj estis foje objektivaj, foje subjektivaj, kaj la forigo de ili estis ofte malfacila. La asocio devis superi malfavoran periodon en la sfero de la ekonomia sekurigo, de sia aktivado kaj reokupo de gvidaj funkcioj.Tiurilate ne malgravan rolon ludis ankaŭ la ĉesigo de la asocia agado en la kvindekaj jaroj.

Tiu ĉi komplika procezo estis krome malhelpata per intence provokitaj krizaj momentoj, kalumnioj pri la ŝtatpotencaj organoj kun la tendenco maksimume misordigi la situacion, veki malfidon ĉe la asocia membraro kaj kompromiti la gvidajn funkciulojn. Tiuj ĉi aĉas intencoj, kaj planoj estis komence eĉ sukcesaj. Sub la influo de diversaj ne tute precizaj kaj ĝustaj informoj ĉesis fidi al la nova estraro de ĈEA ne nur unuopuloj, sed ankaŭ tutaj grupoj. Multaj metodoj estis absolute senskrupulaj kaj malicaj, maldignaj por esperantisto; plej aktive agis en tiu ĉi rilate per siaj artikoloj la estinta membro de la Asocio Stanislav Borovka, kiu fariĝis ekstrema kontraŭulo de Esperanto.

Ekde 1973, kiam mi enoficiĝis kiel sekretario de ĈEA, mia tuta strebado celas envicigon de la asocio en la kulturan vivon de la tuta socio, gajni respekton por ĝi surbaze de la ŝtata kultura politiko kaj starigi ĝin sur la saman nivelon de estimo kaj aprezo, kiujn ĝuas la asocioj en la ceteraj socialismaj landoj.

Pri nia kunlaboro kun UEA : Ni klopodis konformiĝi al ĝia programo, utiligi niajn interesojn en la kadro de tiu ĉi internacia unuiĝo, batali por egalaj rajtoj de la Esperanto-asocioj en la socialismaj landoj kaj kontraŭ la diskriminacio, precipe flanke de la eksprezidanto de UEA, prof. Ivo Lapena, aŭtoro de la pamfleto "Hamburgo en retrospektivo", kiun mi havis okazon legi. Sarlanda Esperanto-Ligo,kiu estas protektanto de prof.Lapena, sendube ne konsciis pri la dusenceco de la "fiera" titolo de tiu ĉi broŝuro. Pro tio mi ŝatus informi ĉiujn interesitojn, ke ĝi estis akceptita de la vasta esperantista publiko vere kiel "Dokumentoj kaj matarialoj pri la kontraŭneŭtraleca politika konspiro en UEA.-De I.LAPENA."

Mia opinio pri ĝi: se iu volis rompi la neŭtralecon de UEA,aŭ konspiri kontraŭ ĝi, la kulpanto nepre ne estas la socialismaj ŝtatoj. Mi povas certigi s-ron prof. Lapenna, ke liaj asertoj pri nia asocio estas absolute malpravaj. Lia rigida reago post la okazintaĵoj en Hamburgo tre klare pruvas, ke tute ne temas pri neŭtraleco, sed solsole pri ofendita malsaneca gloramo de la homo, kiu sentas sin misrespektata kaj - en kontraŭdiro kun sia proklamo favore al la Esperanto - movado - eĉ fondas obstine la novan kontraŭorganizaĵon, la novan universalan asocion esperantistan. Eble la gloramo devojigis la viron, kiu malgraŭ siaj nekontesteblaj sukcesoj kaj meritoj pri la movado forgesis, ke li devus servi la ideo kaj ne male.

En 1975, la jaro de la 30-a datreveno de la libera Ĉeĥoslovakio,ĈEA eniris la tre viglan periodon. Finiĝis la baza reorganizo de la asociaj organoj, pliviglis la aktivado junulara. La laborprogramo de ĈEA akcentas pliprofundigon de la kunlaboro inter la centraj organoj de la

Asocio kaj lokaj grupoj,inter la gvidaj funkciuloj kaj la membraro. Unuafoje dum la ekzisto de ĈEA oni organizas la sukcesplenan renkontiĝon de la ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj en Vsetín, kiu rezultigis spontanan subtenon al la pacstrebado de nia ŝtato favore al la kontraktoj de Helsinki. Tamen per tiu ĉi ĉefaranĝo de la pasinta jaro la asocia agado ne elĉerpiĝis.

La Asocio sekvas senskue sian strategian linion kaj preparas sin por la pluaj pretendaj taskoj en la tempo, kiam nia tuta socio realigas la direktivojn de la XV-a kongreso de KPĈ por la 6-a kvinjarplano.La membroj de ĈEA plene konscias, ke ilia movado havas sencon nur se ĝi helpas la konstruadon de la socialisma socio kaj la pactendencojn tutmonde. La internacia lingvo ne povas esti celo, sed rimedo, kiu akcelas efektiviĝon de la pli riĉa kaj justa vivo por ĉiuj homoj.La Asocio kontraŭbatalas ankaŭ naivajn konceptojn de iuj anoj, kiuj asertas, ke la internacia lingvo per si mem kapablas forigi konfliktojn inter la popoloj. Same ĝi eksplikas la problemon pri la neŭtraleco de UEA kaj akcentas, ke por nia popolo ne estas karakterize esti neŭtrala rilate la problemojn de paco aŭ de milito, genocido, faŝismo, malrespektado de la bazaj homaj rajtoj. Se s-ro prof.Lapenna intencas argumenti tiurilate, ni estas dankemaj pro lia alta aprezo.

Kompreneble ni volas respekti kaj plu respektos la neŭtralecon de UEA. Estus tro naive, se ni volus - kiel la eksprezidanto de UEA kaj liaj adeptoj asertas -"uzurpi la tutmondan organizaĵon". Ĉar ne estas klare, kiel tio utilus al la Esperanto-movado. Ni volas aktive kunlabori kaj akiri la samajn eblojn, pri kiuj disponas la ceteraj asocioj en landoj nesocialismaj. Ni postulas esti konsiderataj paruloj de la decidoplena membrobazo de UEA, paruloj, kiu kapablas konsiderinde altigi la vivkapablon, influon kaj aŭtoritaton de tiu ĉi internacia organizaĵo en la tutmonda skalo. Tio ja estas komprenebla kaj tute natura. Nur la kunlaboro kaj la reciproka respektado de diferencoj inter unuopaj landaj asocioj enkadre de la forta UEA povas kontribui al nia afero, al la firmigo de nia movado, kiu celas efektivigi la ideon de Zamenhof. Ni alvokas al kunlaboro ĉiujn esperantistojn kaj asociojn-eĉ tiujn ekster UEA. Nia asocio fiksis en sia statuto, aprobita de la 2-a kongreso de ĈEA, kunlaboron kun ĉiuj, kiuj emas subteni UEA.Jen la"politika konspiro", kiel sin esprimis prof.Lapenna en la jam menciita verko.

Oni permesu aldoni, ke ĈEA eldonas laŭ siaj eblecoj ĉiujare la ĉs. ekzempleron de Paco kun aparta aldono. Dum sia ekzisto ĈEA eldonis ekzemple Libro de apokrifoj /K.Čapek/, Sileziaj kantoj /P.Bezruč/, La perdita vizaĝo /J.Nesvadba/, Kio estas MEM, Komenio kaj la Internacia Lingvo, Invito al ĈSSR. Ĉijare aperos libreto pri Ĉeĥoslovakio kaj oni preparas resumon pri la agado de MEM okaze de la 25-a datreveno de ĝia fondo. Kunlabore kun AE SSR ni eldonis la tradukon de la Fina Akto de Helsinki en Esperanto. Jam la trian fojon ni eldonis, kunlabore kun Heroldo de Esperanto, la verkon de W.Auld:"Paŝoj al plena posedo",plue la fakan libron de inĝ.M.Tůma "Pri la varmo".Bedaŭrinde tiu ĉi libro ĝis nun ne trovis adekvatan komprenon de la eksterlandaj legantoj. Mencindaj estas ankaŭ kantaretoj, afiŝoj, tekstoj por koresponda kurso ktp. Kompreneble ni atentis ankaŭ la ĉiutagajn bezonojn de niaj membroj : estis eldonitaj 20 specoj de diversaj insignoj, 250 mil glumarkoj, serio de bildkartoj,flagetoj,leterpapero, kristnaskaj bildkartoj ktp.Jen bonvena okazo por interŝanĝo ku la aliaj Esperanto-asocioj kaj unuopuloj.

Ni bone konscias la neceson aktivi samtempe kaj paralele laŭ interkonsentitaj strategiaj celoj kaj sekve elekti ankaŭ la adekvatajn taktikojn, metodon por realigi tiujn ĉi celojn, kiuj absolute ne estas sekretaj: atingi, ke niaj aŭtoritatoj povu en la proksima tempo okupiĝi decidoplene pri la afero de la internaci-lingva problemo kaj pri la aplikado de la internacia lingvo Esperanto.

1. En la sfero de la teoriaj esploroj sur la kampo de la interhoma lingva komunikado, kaj prilaboro de laŭprincipaj seriozaj dokumentoj konformaj al la marksisma filozofio,



2. En la sfero de praktika kunlaboro kun la Esperanto- asocioj en la socialismaj landoj, precipe kun USSR, Bulgario, Hungario, GDR, Pollando kaj ne lastvice kun Asocio de esperantistoj en Slovaka socialisma respubliko.

Kiel jam dirite, ni nepre emas kunlabori ĉiurilate kaj ĉie, kie ekzistas serioza intereso, diskuti kun malsamopiniuloj, se la dialogo okazas sen kaŝaj intencoj, sen misinterpretado de faktoj.

Z.Křimský, sekretario de ĈEA

## MEM-peranto

La bulgara urbo Ruse estis antaŭnelonge kunvenejo de la 39a kongreso de BEA kaj samtempe de la VIIa Ĝenerala Konferenco de MEM, la 13an de julio 1976. En sia raporto la ĝisnuna ĝenerala sekretario de MEM D.Kočvara resumis la ĉefajn aktivecojn de la movado post VIa konferenco en Beogrado 1973, kaj konstatis, ke MEM aktivis en ĉiuj gravaj pacbatalaj eventoj internaciaj.

La nova Internacia komitato de MEM elektis kiel prezidanton N. Aleksiev, kiel vicprezidantojn M.Isaev kaj R.Corsetti, ĝeneralan sekretarion W. Gilbert, sekretariojn D.Kočvara kaj H.Kumaki, centran redaktoron V.Oljanov. Sub la prezidanteco de N. Podkaminer la konferenco akceptis Rezolucion, kiu skizas la ĉefajn taskojn de la movado por la tri venontaj jaroj.

La konferenco decidis en tiu ĉi dokumento intensigi la klopodojn de la landaj sekcioj, komitatanoj kaj perantoj de MEM partoprenigi la esperantistojn en diversformaj aktivecoj favore al paco, garantii la partoprenon de la MEM-delegitaroj en la gravaj tutmondaj aranĝoj, aktive partopreni la kampanjon por la Nova stokholma alvoko kaj plifirmigi la kontaktojn inter la landaj MEM-organoj kaj la landa pacmovado. Sur la interna tereno necesas entrepreni sistemajn paŝojn por plibonigi la organizan nivelon de MEM, plue efektivigi iniciatojn konekse kun la 25-jara jubileo de MEM en 1978 kaj aktivigi la tutan komitaton por la novaj taskoj.

Al la konferencanoj oni disdonis la dokumenton

FINA AKTO DE LA KONFERENCO PRI SEKURECO KAJ KUNLABORO

en Esperanto, kiun antaŭnelonge eldonis Ĉeĥoslovaka Packomitato kaj Slovaka Packonsilantaro en suma eldokvanto de 6000 ekzempleroj.

La eldono de Fina Akto en la internacia lingvo trovis tre favoran eĥon dum la konferenco de propagandistoj de packomitatoj de la socialismaj landoj, kiu okazis komence de junio en Prago.

LA ĈEĤA MEM-SEKCIO sin turnis al ĉiuj lokaj grupoj de ĈEA invitante ilin partopreni aktive en la kampanjo por la Nova stokholma Alvoko. La unua publika kunveno tiurilata okazis en Poděbrady la 12an de julio dum la renkontiĝo de partoprenantoj de korespondaj kursoj de ĈEA.

**NEFORGESU , KE VENOS LA FINO DE LA JARO KAJ VI SKRIBOS LA GRATULACIOJN**

Mendu ilin jam nun, kiam estas tempo !! Nia asocio povas proponi al vi du specojn de la kristnaskfestajn kaj novjarajn grafike arte preparitajn.Kun koverto ili kostas / estas tri koloraj/ 2 kronoj. Por la abonatojn el la eksterlandoj ni povas ilin ekspedi 10 pecojn por 7,- irpk inkluzive de la postelspezoj. Por sendi registrite aŭ aviadile vi aldonu 2 irpk.

## Kiel mi fariĝis laŭreatino

Kiel aŭskultantino kaj korespondantino de la Pola Radio, Esperanto -redakcio, mi regule partoprenas ĝiajn konkursojn. Ofte mi gajnis objektan premion. Antaŭ unu jaro mi gajnis la duan premion okaze de la 15a datreveno de la Esperanto-elsendoj. Nunjare mi havis bonŝancon gajni la unuan - en la sindikata konkurso, kiun proklamis Tutmonda Sindikata Federacio en Prago en la radiostacioj de Prago,Sofio kaj Varsovio.

La 31an de januaro 1976 en ĉiuj fremdlingvaj programoj de la Pola Radio estis anoncitaj la rezultoj de la Konkurso. Venis entute 6005 respondoj, inter ili 380 alsendis aŭskultantoj de la Esperanto-disaŭdigoj. La ĉefaj premioj en tiu ĉi konkurso, simile kiel en la antaŭaj, estis 10 taga rondvojaĝo tra Pollando, inkluzive de senpaga ambaŭdirekta vojaĝo per aviadilo. Tiun ĉi premion gajnis 16 geaŭskultantoj, inter ili du esperantistinoj : s-ino Anna Csápo el Békés, Hungario kaj mi, el Ĉeĥoslovakio. La ekskurso por la ĉeflaŭreatoj okazis en periodo indikita de la Pola Radio ekde la 23.5.ĝis 3.6.1976, La ĉefaj restadejoj estis en Varsovio kaj Sopot. Kompreneble ni disponis pri interpretistoj, kiuj akompanis nin dum la tuta restado. Nin, du esperantistinojn kaj du finninojn akompanis redaktoro de la Pola Radio A.Pettyn . Pri la tuta programo zorgis ĉiĉerono de Orbis J.Kalota.V.Krajĉev, bulgaro, akompanis nin kiel reprezantanto de Tutmonda Sindikata Federacio. Ĉiuj multe meritis, ke ni alportu hejmen belajn impresojn.Pri tiuj mi rakontos al vi en la sekva numero.

Z. Matyková

LINGVO KAJ RASISMO estas la nomo de internacia seminario,kiun organizis Jugoslavia Esperanto -Ligo en Sarajevo /12.-16.8.1976/.La aŭspicianto estis la nacia komisiono de UNESCO.Laborlingvoj de la Seminario estis la serbokroata kaj Esperanto.

DISERTACIO PRI ESPERANTO. "Planlingvo kaj nacia lingvo, kontribuo por esploro de iliaj specifaj komunikadaj kapabloj, montrita per konfronta komparo de kelkaj problemoj el la vortfarado de Esperanto kaj de la germana lingvo", tio estas la titolo de doktoriga disertacio de D.Blanke, estro de la sekcio Esperanto en Kulturligo de GDR. La verko kiu apartenas al kelkaj raraj traktaĵoj tiuspecaj,vekis pozitivan eĥon en lingvistaj rondoj.

EN LA LINGVO DE AMIKECO nomiĝas regula Esp.rubriko en la latva gazeto "Soveta junularo" redaktata de J.Gold, Riga.En sia n-ro de la 3.7.ĝi skribas i.a. pri la vizito de P.Aalto el Finnlando inter la esperantistoj de Soĉi kaj pri la tri esperantistaj familioj en tiu ĉi fama banloko.

EĤOJ PRI PANORAMO. La elsendado de Radio Zagreb informis la 23-an de aprilo pri la aŭtuna n-ro/1975/ de Panoramo, almanako de Starto. La recenzo de E.Lapenna detale prezentas ties enhavon kaj aprobas i. a.,ke ĉiuj aperintaj tradukaĵoj estas provizitaj per mallonga prezento de la aŭtoroj. "Panoramo estas gratulinda frukto el verda bedo de ĉeĥaj esperantistoj",konkludas la redaktorino.

Olga Valentová-du Temple skribis el Kanado: "Panoramo al ni ege plaĉas. Ni opinis, ke kompare kun la ceteraj Esp.revuoj ĝi havas unikan nivelon. Laŭ la nomoj de tiuj, kiuj partoprenas en ĝia kreado oni povas juĝi,ke Panoramo daŭre tenos tiun ĉi pozicion".

NEFORGESEBLA ETOSO EN LANČOV.



Ne nur agrabla feriado nin altiris ĉijare al SET Lančov, sed precipe la vere internacia atmosfero.Ni konatiĝis tie kun ĉeĥoj,poloj,slovakoj,hungaroj, bulgaroj, rumanoj,eĉ kun nederlandano kaj kanadano,sed neniam aŭdis ian malbonan vorton

daŭrigo sur 16 p/



# Inter konscio kaj konsciigado

Ĉiam pli evidentaj fariĝas la ebleco kaj la bezono starigi la vivantan planlingvon en la praktikon de la internacia vivo. Tion argumentis ankaŭ lastatempe pluraj interlingvistoj, inter ili la sovetaj, en sia kolektiva verko Problemoj de interlingvistiko eldonita de Soveta Akademio de Sciencoj en Moskvo.

Enkadre de UEA vastiĝas iniciatoj por penetrigi la IL sur la parlamenta, partia, sindikata kaj sporta terenoj. Ilia komuna celo estas diskonigi la ideon de interlingvo kaj kompetente prezenti ĝin kiel instrumenton taŭgan por la tutsociaj bezonoj.

Ekzistas tamen misproporcio inter la objektivaj postuloj de nia epoko kaj la subjektivaj disponoj de la interlingva movado, kiu postrestis la dinamikon de socia evoluo kaj ĝis nun ne ĉiam adekvate funkciigis sian instrumenton en la hasto de internaciaj eventoj.La jam tradicia rolo de iu riproĉanto pri "malracia kaj indiferenta" sinteno de la mondo devos cedi al tiu de la aktiva subjekto. La mondo,pri kiu oni tiel ofte plendas,ege ŝanĝiĝis, dume la movado, kiu celas solvi la tuthomaran problemon de interkompreniĝo, kvazaŭ rezervis al si nur la prilingvan kompetenton. Tiu ĉi lingva kriterio adaptiĝas ankaŭ en aprecado de diversaj aplikoj de E-o kiel literaturo, lasante la liberan vojon al subjektiveco.

Venki la "indiferentecon" de la mondo oni ne povas per nura, eĉ se amasa kaj formika laboro aŭ per aŭdacaj intervenoj, se al ambaŭ mankas firma teorio surbaze de la lastaj atingoj de la homara progreso. Malracia kaj blinda estas la espero pri la fina venko de Esperanto, se aliflanke mankas amasa konscio pri la ĉiutagaj kaj perspektivaj taskoj de la movado. Kompreneble, la movada konscio, kiu hodiaŭ, en la tempo de spacveturoj, fidas je la Fundamento, nepre konfliktas kun la realo.

Ĉe diversaj okazoj oni povas konstati, ke la edukiteco pri la ĝenerale interlingva problemo estas preskaŭ nula. Preventan paŝon oni devus fari jam en la bazaj edukaj kaj klerigaj programoj; lingvo-kursoj, lernejoj, seminarioj.Anakronisme estas, ke la instruiteco pri Esperanto sur tiu ĉi nivelo sin limigas - krom elementaj gramatikaj konoj- je kelkaj prihistoriaj kaj priliteraturaj konstatoj, dume la kerno de la problemo, nome apliko de Esperanto en la multlingva mondo, estas preskaŭ neglektata. Kulpas pri tio ankaŭ la gazetaro en la internacia lingvo, kiu grandparte malobeas sian edukan mision, kaj anstataŭ komenti eventojn, ofte ŝparas lokon por ekskluzive gramatikaj analizoj kaj disputoj. En la eldona aktiveco, sur la libromerkato, ankaŭ ne ekzistas pruveblaj faktoj, kiuj kontestus tiun nedezirindan disipon pri la modestaj rimedoj de la movado. Kompare kun la grandioza tasko de la science planita lingvo mirigas grandanima "kontraŭplana" aktivado.

Aliflanke ankaŭ la informado, kiu celas la publikan opinion, devus esti larĝskale ligita al ĉiuj sociaj sferoj, kie la internacia lingvo povas kaj devas funkcii kaj tio postulas denove esploron pri la koncernaj funkcioj kaj sisteman konsciigon pri ili. Sed nur per kompetenta informado, provizita per fakaj konoj oni rajtas esperi plenumon de tiu ĉi tasko kaj interesigi tiamaniere la politikajn, sciencajn kaj aliajn rondojn. Tiun ĉi komision la esperantistoj ne povas eviti.

O.Kníchal

DISKRIMINACIO EN EŬROPA PARLAMENTO ※ Laŭ anglalingva raporto en la bulteno "Eŭropa Parlamenta Raporto" n-ro 22, s-ro T. Normarton, brita parlamentano, komencis agadon por Esperanto en Strasburgo. Post la demando pri tre alta kosto de interpretado /12 milionoj da britaj pundoj jare/ li sugestis, ke oni uzu Esperanton. Komisionano Borschette diris, ke la afero estas delikata kaj Eŭropo vere valoras nur se ĉiu esprimas sin en la propra lingvo.

## HEA kaj BEA kongresis

Oni ĉiam ĝojas pro la atingoj de siaj amikoj. Tiun ĉi konstaton oni devas rekonfirmi post la partopreno en la du naciaj kongresoj – en Hungario /fine de junio en Komló / kaj en Bulgario /meze de julio en Ruse/.

La hungara movado neniam estis tiel forta kiel nun, diris en sia kongresa raporto la ĉefsekretario de HEA I.Kutas. La asocio havas pli ol 5000 membrojn, Esperanton lernis lastatempe 3000 personoj. Prestiĝan kaj unikan lokon okupas la movado en la publika opinio kaj en la parlamentaj medioj. Pri tiu ĉi pozicio atestis ankaŭ la ĉeesto de pluraj politikaj reprezentantoj en la kongresejo.

Altan publikan reputacion ĝuas ankaŭ la bulgara movado, kies 39an kongreson alparolis reprezentantoj de diversaj sociaj organizaĵoj. Pli ol mil partoprenintoj kaj kelkdekoj da eksterlandaj gastoj aŭdis la raporton de N.Aleksiev, la ĝisnuna prezidanto de BEA kaj prezidanto de MEM. Efika estis publika kunveno, kiun salutis la tri esp. delegitoj. Pri la VIIa Ĝenerala konferenco de MEM, okazinta post la kongreso, ni raportas aliloke.

La hungaran kongreson partoprenis kiel delegitoj de ĈEA M. Turková kaj O.Kníchal, tiun de BEA M. Josková, V. Kvasničková, D. Kočvara, O.Kníchal.

### RONDETA VIVO

O S T R A V A –"Per Esperanto por la interkompreniĝo" estas la titolo de ekspozicio reinstalota jam la trian fojon en la Societa Domo, komence de septembro. Samtempe okazos en VŽKG la internacia filatela ekspozicio kun Esperanta temaro.

P Ř Í B O R – La 20an de junio oni partoprenis renkontiĝon sur Ĉantorio kaj kunvenis kun siaj polaj gekorespondantoj. Samtempe finita kurso por komencantoj- Solena kunveno okaze de la 725 jara datreveno de la urbo preparata.

Z N O J M O – Okazis la 10an de junio amuzvespero kun kantoj, deklamado, ludoj kaj konkursoj. Inter la 22 partoprenintoj estis ankaŭ la novaj adeptoj de E-o.

P R A H A – La ĉefurba Pedagogia Instituto eldonis antaŭnelonge metodikan manlibron "Aby byli lidmi socialistického zítřka" /Por ke ili estu homoj de la socialisma morgaŭo/ de Eli Urbanová, en aparta ĉapitro sur la paĝoj 81-83 skribas la aŭtorino pri E-o.

### KRONIKO

Okdekkvinjariĝis la honora membro de ĈEA František P y t l o u n en Poděbrady. Dum la junia renkontiĝo de partoprenantoj de korespondaj kursoj oni transdonis al la jubileanto salutleteron de ĈEA.

Okdekjariĝis 27.7. L. D a n i e l en Prago, esperantisto ekde 1912 o Al esperantista geedza paro Čech en Česká Třebová naskiĝis la tria knabo Radovan. Bondeziron al la gepatroj Míla kaj Sváťa o Al la geedzoj Kočvara en Opava naskiĝis la filo Marek. Nian gratulon !

F I N A A K T O de la Konkonferenco pri sekureco kaj kunlaboro en Eŭropo senpage havebla en la sekretariejo de ĈEA, Jilská 10, 110 00 Praha 1. La dokumenton eldonis en Esperanto Ĉeĥoslovaka Packomitato kaj Slovaka Packonsilantaro. Mendante la eldonaĵon aldonu dukronan poŝtmarkon aŭ 1 irpk.

ESPERANTSKÝ VÍKEND U SYCHERÁKU

uspořádali členové místní skupiny v Boru, okr.Tachov ve dnech 26-27.června. Zúčastnili se jej také" přespolní" z Plzně a Karlových Varů. Po dva dny se návštěvníci oddávali koupání, slunění a večer zpěvu u kytary-společně s táborovými hosty z vedlejších stanů. Všichni se shodli na tom, že jedno setkání letos nestačí a že podobné táboření je tou nejpřirozenější formou propagace esperanta.

Borští esperantisté propagují mezinárodní jazyk rovněž velkými a působivými poutači ve výkladní skříni nového Domu služeb a k letní rekreaci nabízejí služby svého "esperantského domečku". Z městečka je výborné spojení na Chodsko, Mariánské lázně aj. Počasí je příznivé i v pozdním létě a po celý rok. Pozvánka tedy zní: Přijeďte do Boru u Tachova!



# Mia plej kara rememoro

En SET-ano, informilo pri Somera Esperanto-Tendaro en Laňov/1976 / rememoras pri sia 60 jara esperantisteco profesoro T.Kilian, interparolante kun P.Sittauer, tendara mastro. El bunta mozaiko de la rakontado ni prezentas kelkaj erojn al niaj gelegantoj.

En la jaro 1923, kiam la radio ankoraŭ estis en infanaĝo, Prago jam elsendis sian unuan paroladon en Esperanto. Kvin jaroj pli poste Brno elsendis la unuan kurson de Esperanto. En la jaro 1932, aŭskultinte esperantan paroladon el Brno, mi vizitis la stacion kaj proponis al la ĉefo de la literatura sekcio Dalibor Chalupa esperantan paroladon. Li ĝoje akceptis mian proponon kaj ni tuj difinis la temon: Belaĵoj de ĈSR. En mia unua esperanta parolado mi priskribis la fabelan subteran mondon de l'Moravia Karsto kun diverskoloraj grupoj de stalagmitoj kaj stalaktitoj, kiuj prezenti al la rigardanto kiel fantaziaj bestoj, personoj kaj objektoj kaj je la fino de la parolado en la radio mi aldonis jenan alvokon:

Karaj gesamideanoj, se vi deziras, ke la radio-stacio en Brno fariĝu via stacio, mia "Verda Stacio", skribu tuj, ankoraŭ nun vespere, kiel vi min aŭdis kaj kion vi dezirus scii pri nia respubliko. Ĉiu skribinto rekompence ricevos la ilustritan broŝuron

M o r a v i a K a r s t o .

La promeso efikis. Alvenis ondo da poŝtkartoj kaj leteroj. Preskaŭ ducent. Inter ili de la plej kara kompetenta pioniro de Esperanto, de s-ano Theodor Čejka.

Venis leteroj kaj poŝtkartoj el preskaŭ ĉiuj landoj de Eŭropo, venis du-tri el norda Afriko kaj eĉ unu el Aŝĥabado en Turkmena SSR. Ĉiuj skribantoj akcentis bonan aŭdeblon kaj klaran prononcadon, kaj ĉiuj petis daŭrigon de esperantaj elsendaĵoj. Unu skribinto adresis sian poŝtkarton koncize

Verda Stacio, Brno, ČSR

kaj ĝi tamen trovis sian adresaton. Respondante al ĉiuj skribintoj mi, kaj poste ankaŭ la aŭskultantoj, ekuzis tiun ĉi kurtan praktikan adreson: tiel naskiĝis la en Esperantujo populara "Verda Stacio, Brno." Ĉiu skribinto, kompreneble, ricevis de mi la promesitan broŝuron, kiuj kostis multe pli ol faris mia honorario por la parolado.

Favora prijuĝo de mia voĉo kaj la poŝtkarto de s-ano Th.Čejka kaŭzis, ke oni komisiis al mi krom paroladoj ankaŭ la gvidadon de esperantaj kursoj. Brno elsendis tiam ciklon da tre interesaj paroladoj sub la titolo

"Per kio kontribuis la ĉeĥoslovaka scienco kaj arto al la monkulturo."

La paroladojn, kies aŭtoroj estis universitataj profesoroj, mi tradukis esperanton, sed antaŭ ilia elsendado mi informis la aŭtoron, ke mi havos la honoron antaŭlegi lian paroladon en la radio en la internacia lingvo Esperanto. Samtempe mi dediĉe al ĉiu mian esperantan lernolibron.

Tuj en unuaj tagoj de l'okupacio far la nazia krimarmeo vizitis min tri gestapanoj el Brno. Mi estis tiam prezidanto de la tiea esperantista Klubo kaj ili postulis, ke mi transdonu al ili la kluban korespondaĵon. Mia respondo, ke la korespondaĵon havas ne mi, sed la sekretario de l'klubo, ilin mirigis. Post pli ol tuthora esplorado kaj kelkaj danĝeraj momentoj ili forveturis. En tiu terura tempo ne eblis labori por Esperanto, mi do tralegis ĉiujn ankoraŭ nelegitajn esperantajn librojn de mia biblioteko. Kiam la nazioj forigis el ĉiuj radioaparatoj la kurtajn ondojn, mi aniĝis al okcident-moravia partizana grupo Re-Vi /Republika Vítězí/, kaj kamarado Straka, ano de la grupo, muntis en mian aparaton anstataŭaĵon, "ĉerĉileton", kiu ebligis aŭskulti kurtajn ondojn. Mia devo estis aŭskulti la radiostaciojn Moskvo, Londono,

Parizo kaj Beromünster en Svisio. Pri gravaj novaĵoj mi devis informi la grupon kaj disvastigi ilin en fifindaj amikaj rondoj. Ĉiutage mi aŭskultis ĝis la noktomezo spite la averton sur la aparato: " Atentu, atentu ! La aŭskultado de fremdaj stacioj estas punata per malliberejo aŭ morto !" Ofte okazis, ke konato konfidence rakontis al mi la "plej freŝan" novaĵon, kiun mi antaŭ du horoj rakontis al alia konato. Ankaŭ konfidence ! Amikoj ofte min avertis, ke mi elektu miajn konatojn pli singardeme. Dank'al dio ne troviĝis inter ili perfidulo. Post la milito mi estis honorita de la Asocio de Kontraŭfaŝistaj Batalantoj per la medalo " Pro Fideleco ".

Kiel ĉiu novbakita esperantisto mi korespondis kun granda nombro da gesamideanoj kaj la rikolto estas la rakontaro LMR- La Mondo Rakontas. Sed mi povas fieri ankaŭ pri tre famaj korespondantoj. Inter ili estas mia estimata amiko Ŝtjepan Pavloviĉ Titov. En iu gazeto mi legis,ke la patro de la kosmonaŭto G.S. Titov estas esperantisto kaj ke li, la patro kaj la filo, naskiĝis en Siberio en la Altaja regiono. Tio mirigis min. Kie li povis en siberia vilaĝo lerni Esperanton ? Mi longe cerbumis, konjektis, rezonis : 450 km sude de Tomsk estas la urbo Barnaul, kaj tie vivis la instruisto kaj verkisto A.M.Toporov, kiu estis esperantisto. Se la naskoloko de s-ano S.P.Titov estas proksime de Barnaul, tiam lia esperantistiĝo estas klara. Mi do skribis al kolego S.P. Titov, li estas faka instruisto, gratulis al li pro la grandioza sukceso de lia filo kaj sciigis al li mian supozon pri lia esperantistiĝo. Mi apudmetis mian foton kun mia edzino kaj ĝentila dediĉo. Je mia granda ĝojo mi baldaŭ ricevis de li respondon. Rekompence li apudmetis foton kun sia edzino kaj jena dediĉo: "Al sia ĉeĥa amiko kaj lia estimata edzino la patro de kosmonaŭto -2 S.P.Titov". La fotokopioj de la letero kaj la foto kun la dediĉo aperis siatempe en Heroldo de Esperanto kaj en la bulteno de UEA Esperanto. Sian amikecon s-ano S.P.Titov esprimis al mi eĉ sur radio-ondoj. Veturante hejmen de Universala Kongreso li amike kaj kore salutis min per la varsovia radio. Paŭlo, ĉu vi memoras, lian afablan saluton ni kune aŭskultis ĉe via radio-aparato. Supozeble mi estas la sola Ĉeĥo, kiu povas fieri pri amikeco al s-ano S.P.Titov. Pli poste mi sendis al s-anoj S.P.Titov kaj A.M.Toporov mian grandan lernolibron, la lecionaj tekstoj kaj la legolibro tre plaĉis al ili. Rekompence ili donacis al mi siajn verkojn kun amika dediĉo.

## Lingva artefariteco - kulturmanko?

## ➡ MALE!

Okazas de tempo al tempo,ke lingvistoj akcentas kiel negativan tiun ĉi flankon de artefarita lingvo:ĉar ĝi ne eliras el la naska tero,ĝi ne povas esti fonto de kulturaj valoroj.

Sed, se tia lingvo servu plie kiel ilo de interkompreno ol por la celoj de kultura imperiismo, temas ĉi tie ne pri manko,sed ĝuste pri malo. La historio pruvas, ke la kulturo disvolviĝadis ĉirkaŭ lingvoj, kiuj origine estis iloj de pure materiala interkompreniĝado. Se, simile ĉirkaŭ internacia lingvo kreiĝas internacia kulturo,ĝi estas nur ĝojiga. Esperanto estas per siaj multnombraj originalaj verkoj, prozaj kaj versaj,pruvo, ke la artefarita lingvo,se ĝi estas uzata, tutplene povas kreadi proprajn kulturaj valorojn.

Fine: la ĉefa afero estas,ke la dirita konvinko ne estas fabrikita de mi, malnova esperantisto,sed ke la aŭtoro de tiu pozitiva konstato estas unu el la plej altaj lingvaj aŭtoritatoj, la fama usona/do angalalingva/ lingvoscienco Mario PEI. /Vidu la ĉeĥan gazeton "ZZ 100+1", n-ro 1/1964, p.36-37,kiu ĝin represis el la pariza "Le Courrier".

J. Mařík

PRI LA LINGVO DE ESTONTO nomiĝas ampleksa artikolo de O.Kníchal publikiĝita en la sabata aldono de Rudé právo la 31an de julio 1976. La temo de la unua tiaspeca artikolo en la ĉeĥlingva gazetaro estas multlingveco kaj ties solvo, kiun prezentas planlingvo.



# FERVOJISTA SEKCIO

La sekcio sincere invitas al partopreno en la V-a Konferenco, kiu okazos inter la 4a kaj 5a de septembro 1976 en Přerov.

P r o v i z o r a   p r o g r a m o :

3.9. Alveno de la partoprenantoj
4.9. 9a h. Traktadoj
13a h. Komuna tagmanĝo
14a h. Vizito al la urbo, projekciado de filmoj /diapozitivoj/
20a h. Interkona vespero
5.9. 8a h. Ekskurso al la antikva urbo Kroměříž
13a h. Fermo de la konferenco.

Precizaj informoj kaj aliĝiloj ĉe F.Markl, sekcia sekr.,ul.S.K. Neumanna, čp.čp. 359, 560 02 Česká Třebová.

LG "Amikeco" en Česká Třebová organizis antaŭnelonge marŝon "20 verdaj kilometroj" tra ĉarma ĉirkaŭaĵo de tiu ĉi urbo. Venotjare oni intencas ripeti ĝin por krei la tradicion de la nova aranĝo.

LA VERKO DE EIFEL EN MORAVIO

Vojaĝante per trajno el Brno al Znojmo, antaŭ la stacio Moravské Bránice oni traveturas la valon de la rivero Jihlava. El la fenestro de la trajno oni povas ĝui sole la 40 metran profundon de tiu ĉi valo. Sed la impona konstruaĵo de la ŝtala viadukto estas videbla nur de malsupre, al la valo mem. Malmultaj scias, ke sur ĝi troviĝas la nomoj de la francaj inĝenieroj gvidataj de A.G.Eifel, la projektisto de la fama turo en Parizo. Eblas eĉ diri, ke la ponto apud Moravské Bránice, konstruita en 1886-1870, estis unu el la ŝtupoj, per kiuj Eifel perfektis sian arton por starigi la simbolon de Parizo. La origina ponto, longa 373,5 m, ĝis hodiaŭ funkcias, kvankam ĝi ne plu kapablas plene servi al la nuntempa trafiko. Tial tuj apude kreskas nun - 37 m super la akvonivelo - ĝia moderna simildulo, ankaŭ ŝtala, 382,2 m longa kaj pezanta 2557 tunojn. Oni finos ĝian muntadon la 31.8.1976 la 31.8.1976.

/ Laŭ " Mladý svět " /

## Ĉu varbi nur „seriozulojn"?

Jes, certe, sed kiom da rigore ekzamenitaj instruistoj instruas en lokaj grupoj ? Tutcerte estas multaj grupoj, kiuj dependas nur de tiuj instruistoj, kies entuziasmo ofte superas ilian lingvoscion, ĝuste pro la manko de spertuloj.

Ĉu por ĝuste kaj bone paroli la lingvon sufiĉas la ĝisnunaj lernolibroj ? Mi estas certa, ke ne. Oni bezonas bonan gramatikon de Esperanto kaj ĝi tute ne estas havebla. Tamen la gramatiko sufiĉas nur por paroli ĝuste, sed ne bone. Ankaŭ la vortaroj lastatempe eldonitaj ne sufiĉas. Nek la skribaj kursoj nek tiuj en Lančov k. a. estas sufiĉaj pro sia mallonga daŭro. Krome ne ĉiu homo kapablas lerni kion ajn ĝis la plej alta grado. Ĉu ni diru, ke tiujn homojn ni ne toleros inter ni ?

El la letero de inĝ. E. Jindřich

"Perdita vizaĝo" i "Apokryfy" jsou výborné čtení, zábavné, přitažlivé. Postrádám však něco dalšího z české literatury, něco podobného jako je "Nuda inter lupoj" z NDR nebo "Sklavoj de dio" z maďarské historie... Aspoň že toto vakuum se snaží vyplnit PANORAMO. To poslední mne tak zaujalo, že i tři básně jsem se naučil nazpamět. A překlad Saturnina, to je požitek číst i pro mne "poloesperantistu". Z článku p. Zmeškala mám dojem, že bych snad ani Esperanto neměl používat, dokud je neovládnu perfektně.

Z dopisu V. Trojana, Žacléř

Karolo Piĉ

# Superstiĉo de internacieco

Internacieco estas nur perilo. Ĝi devas subtenadi la sistemon, neniel renversadi ĝin. Tial internacieco tute ne estas la unua principo de la lingvo, sed principo nur helpa, duaranga, akcesora. Pro tio ekzemple la artefarita serio korelativa ne nur povis pruviĝi kiel plene vivanta, sed eĉ kapablis elmontri tendencojn plivastiĝi /aliu, aliam, aliel ktp./, kaj alia elpensaĵo, la nedifinita prepozicio je estis tiom alloga, ke ĝi sukcesis transiri eĉ en Okcidentalon. Tial tro akcentadi la internaciecon fakte signifas levadi la aspektan trajton de la lingvo super ĝian trajton funkcian. Sed lingvo ne estas virino. Pro tio ĉe lingvo ne gravas la vizaĝo, sed la interna mekanismo ene.

Lingvo internacia estas afero altgrade teknika. Sekve la tiel nomata lingva naturalismo estas nenio alia ol la plej ridinda lingva mistikismo, idealismo en la filozofia senco de la vorto, plie en la plej malbona senco de tiu vorto. Tial ideanoj de lingva naturalismo ne estas progresemuloj, sed ordinaraj reakciuloj /ĉi tiun etiketon tamen komprenu sen ia ajn kromsenco politika: ĝi esprimas simple nur kontraston: antaŭen – retren, pluso – minuso, ago – reago/. Naturalismo tiel estas obstaklo sur la vojo, ŝtonego, kiu baras liberan komunikadon.

Por Esperanto nur unu sola ismo estas akceptebla: lingva teknikismo. Kutime ni ne konscias tion, sed Esperanto estas la plej bela teknika invento kaj entute unu el la plej grandaj teknikaj inventoj de la 19-a jarcento. Kaj se Esperanto venkis, ĝi venkis pro tio, ke interne ĝi iel respondas ĝuste al la teknikaj pensmaniero kaj spirito de la 20-a jarcento.

Sed lingva naturalismo havas ankoraŭ unu flankon: ĝi estas ĉu intenca, ĉu neintenca esprimo de kaŝita imperiismo de iuj okcidentaj lingvoj, kiuj estas nek la plej grandaj nek la plej perfektaj inter la lingvoj de la mondo, kaj kiuj tial tute ne povas arogi al si la rajton dikti al Esperanto, kio estas natura kaj kio ne! Krome la latinidĝermana parto de la homaro estas pli ol favorata jam per la ekzistanta latinidĝermana protoradikaro esperanta. Pliaj latinigado kaj ĝermanigado de Esperanto tial estus nepravigeblaj. Ĉar aliel Esperanto baldaŭ estus pli okcidenteŭropa ol Occidental. Kio tamen tute ne estas invito al respektiva slavigado de la lingvo de Zamenhof. La protoradikaro de Esperanto restu tia, kia ĝi estas: pli malpli latinida. Ses oni enkondukadu nur protoradikojn kaj ne tutajn grupojn da samdevenaj pseŭdoradikoj, kiel la jam konataj inkludi, ekskludi, konkludi, inkluzive, ekskluzive /5 novismoj sume!/, kiuj fakte estas nenio alia ol simplaj derivaĵoj de unu sola kludi: en-kludi, el-kludi, kun-kludi, en-klude, el-klude, pre-kludi, re-kludi, ktp.

Lingva naturalismo en interlingvistiko estas esence kontraŭa al la celoj de interlingvistiko entute, kaj al la ideo de planlingvo precipe, ĉar en planecon, kiu devus esti la ĉefa kvalito de interlingvo, ĝi enportas senplanecon kaj hazardecon de la lingvoj naciaj, respektive planelementojn aliajn, ol estas tiuj, kiuj rezultas el la logiko de la koncerna planlingvo. Alivorte: En Esperanto estas natura nur tio, kio respondas al la esperanta sistemo!

Cetere naturalismo estas nelogikaĵo eĉ en si mem. La plej perfekta naturalisma interlingvo de latinida tipo ne estas Interlingua, sed la klasika, mezepoka kaj postmezepoka lingvo latina. La plej perfekta naturalisma interlingvo de romanĝermana tipo ne estas Occidental, sed la angla de Shakespeare kaj G.K. Chesterton. Tamen – ĉu la naturalistaj "inter" lingvistoj, ĉu entute ĉiuj naturalistaj klopodoj en Esperanto ne celas ĝuste ĉi tion: fine anstataŭigi Esperanton per la latina aŭ angla?



Internacieco fariĝis moda idolo same kiel hipioj, longaj haroj, maksijupoj kaj popmuziko. Sed simile kiel tiuj ĉi, ankaŭ ĝi ne havos longan vivon. Ĉar naturalistoj estas kiel homoj, kiuj, por starti en aŭtomobila konkurso, venus kun kaleŝo kaj du ĉevaloj. Nu, tie oni sendus ilin ien, eĉ kun iliaj aristokrataj bestoj kaj kaleŝoj. Mi estas ĝentila. Mi ne sendos ilin ien. Mi nur konstatos, ke ekzistas homoj, kiuj preferas kaleŝojn kaj ĉevalojn. Kiom min koncernas, mi preferas fordon kun du mil ĉevaloj sub la kapoto !

La naturalismaj projektoj staras sub unu sola influo. Ili estas viktimo de unu sama superstiĉo. Esence ili ĉiuj estas profunde okcidentalismaj, kaj malgraŭ laŭtaj internaciecaj fanfaroj fakte ĝisoste antiinternaciismaj: ili estas interlingvoj nur de unu tre limigita parto de Eŭropo. Nenia kamuflo povas nei tion. Foriginte "Occidental" favore al "Interlingue" oni ankoraŭ ne forigis la okcidentalismon mem. Ŝanĝinte la nomon, oni ne ŝanĝis la realon: panokcidenteŭropecon. Tial naturalismaj lingvoj reprezentas lingvan paroĥismon en interlingvistiko. Kio tute ne mirigu nin, ĉar ĉiu naturalismo estas tradicia, malvasta, antimoderna kaj antiteknika.

En interlingvistiko ekzistas nur unu sola aliro: la funkcia. Voli "naturan" interlingvon estas same kiel voli "bluan" lingvon aŭ " rozkoloran" lingvon. Zamenhof ne kreadis "verdan" lingvon, sed antaŭ ĉio logike funkciantan lingvon. La naturalistoj volas, ke iliaj lingvoj laŭeble plej strikte similu aŭ al la franca, aŭ al la angla aŭ latina. Sed tio estas same absurda kiel se la medernaj raketkonstruistoj volus, ke iliaj raketoj kiom eble plej multe similu al agloj aŭ cikonioj! Kio nur rekonfirmas la jenon: Kutime oni povas diri, kio estas logika. Kutime oni ne povas diri, kio estas natura. Ĉar "natura" estas kategorio mistika. Tial decidadi pri natureco aŭ nenatureco signifas decidadi, kiom da anĝeloj povas stari sur unu pinglopinto, aŭ, se vi volas, prijuĝadi, kiu natureco estas la pli natura: ĉu la franca, angla, hispana aŭ latina, aŭ respektive diskutadi, kiu plena ujo estas la pli plena, ĉu la duonlitrujo, dulitrujo aŭ kvinlitrujo ?!

Ne ĉio, kion oni deklaras internacia, vere estas internacia. Kaj tamen ni vidas, ke anstataŭ riĉigadi la komunan lingvaĵon, oni ĉiam pli kaj pli ŝanĝas Esperanton en ian ridindan slangon de la plej malalta "sciencoza" tipo.

La neĝermanaj kaj nelatinidaj parolantoj de Esperanto rigardas ĉi tiujn tendencojn tre skeptike kaj kun pliiĝantaj zorgoj. Iliaj propraj naciaj lingvoj ne malofte posedas eĉ centojn da afiksoj, kiuj al ĉi tiuj lingvoj pruntas neimageblajn flekseblon kaj esprimpovon. Kaj ĉar ĉiuj ĉi afiksoj, ĝenerale, estas parto de la komuna, ĉiutaga vorttrezoro, ili kaŭzas, ke ekzemple iuj slavaj lingvoj kelkrilate estas multe pli riĉaj kaj nuancohavaj ol la franca. Kompreneble pri tia riĉeco tute ne povas revi Interlingua pro tio, ke en lingvo de naturalisma tipo tia abundo estas simple nepensebla.

Kaj tamen pseŭdoesperantistoj en niaj vicoj plu defendas lingvan naturalismon, argumentante interalie eĉ per la tiel nomataj " fremdaj vortoj ". Estas vero, ke preskaŭ ĉiu lingvo posedas fremdajn vortojn. Sed kompare kun la indiĝena esprimaro la fremdaj vortoj kutime reprezentas maksimume 2 – 3 / de la koncerna vortostoko. En Esperanto, kontraŭe, la situacio estas tia, ke la lingvo de Zamenhof baldaŭ konsistos nur el fremdaj vortoj ! Jen galimatio kaj miŝmaŝo, kiu povas ekzisti nur tial, ĉar oni ne scias /aŭ ne volas scii/, ke la nombro da fremdaj vortoj en iu lingvo samtempe estas eĉ kvantometro kaj tensiometro de ĝiaj internaj kvalitoj kaj neerariva atestilo pri ĝia ena valoro. Slango, konsistanta el nuraj fremdaj vortoj ja ne estas lingvo, sed sole mizera vortkolekto, same kiel nuraj ŝtonoj, eĉ marmoraj ŝtonoj, ankoraŭ ne estas katedralo pro tio, ke lingvon ne elkreas vortoj, sed stilo, kaj ne faras ĝin paroleroj, sed severa arkitektura ordo! Mi komprenas, ke ignorantoj ĉi tion ne komprenas. Mi esperas, ke artistoj scios, pri kio estas la babilo!

La vorta internacieco estas nur supraĵa : ĝi ne estas internacieco,

ĝi estas ŝajno de internacieco. Ĉar la vorttrezoroj de la angla, ĉeĥa kaj ĉina havas nur tion komunan, ke ili havas nenion komunan, kaj ili similas sole en tio, ke ili malsimilas en ĉio. Kompreneble super tia internacieco oni devus malesperi. Feliĉe krom la iluzia, ĥimera internacieco ekzistas ankoraŭ ia pli profunda kaj pli vasta internacieco de rezonado, de interaj rilatoj, de la plej malgranda peno kaj plej granda efiko, la internacieco de psiko kaj psikologio: struktura internacieco. Ĝi igas unu francon Edmond Privat skribi sur-signo 1/ anstataŭe de la dusenca insigno, alian francon uzi interpreni surloke de la same nekonsekvenca entrepreni, kaj E.Vilborg paroli pri novismoj anstataŭ pri neologismoj 2/. Sed laŭ la postuloj de la struktura internacieco jen eĉ ekspozicio ne estas internacia, ĉar ĝin konas nur kelkaj okcidenteŭropaj lingvoj. Kontraŭe vere internacia estas la indiĝena el-pono /elpono de poŝtmarkoj, interalie/, kiu respondas ne nur al la ĉeĥa kaj la similformaj slavaj vý-stava, al la germana kaj la analogaj ĝermanaj Aus-stellung, sed ankaŭ al la latina ex-posit-io, kiu same estas nenio alia ol nur, tute laŭvorte, el-pon-o, el-met-o!

La naturalismaj formoj povas fantomi en Esperanto tial, ĉar ĝis nun, kaj finance kaj literature, Esperanto staris sub forta hegemonia influo de la Okcidenta Eŭropo. Tuj kiam la situacio ŝanĝiĝos kaj pli konsiderinde komencos aŭdiĝi eĉ aŭtoroj slavaj, ĉinaj, hindaj,japanaj,afrikaj kaj indianaj, la nuna "franca" periodo estingiĝos senpostsigne kaj enmerĝos 3/ same rapide kiel ĝi elmerĝis. Kaj kun ĝi malaperos ankaŭ la naturalisma pseŭdointernacieco, fremda ne nur al la skemeca, kunmetada karaktero de la aglutina Esperanto, sed precipe kaj ĉefe eĉ profunde malpropra al la internacia karaktero de la homa pensado! Ĉar parolanto, kiu ne scias la anglan, francan aŭ latinan, tute ne komprenas kial li uzu ekspozicii, se li povas uzi la derivitan el-poni,cetere tute same, kiel li jam delonge uzas trans-poni, de-poni kaj, analoge, eĉ post-poni, kun-poni ktp.

Kio tamen ne signifas, ke ni volus ekstermi ekspozicio. Ĝi restu apud la indiĝena formo /la klubo aranĝis elponon de esperantaj libroj; la ekspozicio tre sukcesis/. La lingvo tiel pliriĉiĝos kaj unu el la vortoj ricevos utilan sinonimon.

Aliflanke la plena disvolvo de la internaj fortoj kaj kapabloj de Esperanto estas necesa eĉ alikaŭze. Al Esperanto ankoraŭ ĉiam mankas "iq", ia profana senĝeneco, ia griza, ĉiutaga ordinareco, kiu estus tauga kontraŭpezo de ĝiaj denaskaj literatureco kaj lingvistika aristokrateco. Tamen tiun ĉi breĉon tute ne ŝtopos sencesaj naturalismaj pruntoj el ekstere. Ĉar fremdaj vortoj havas sencon nur tiam kaj tie, kiam kaj kie ili estas sinonimoj, tio estas kiam kaj kie apud ili jam ekzistas aŭtentaj vortoj propraj. Kaj ĝuste ĉi tie Esperanton atendas granda tasko !

Internacieco ne estas derivita, io nur supraĵa kaj laŭaspekta, sed tute male io profunde propra: ne imito, sed invito, ne deliro, sed aliro! La greka arto fariĝis internacia ne pro tio, ke ĝi kopiadis Babilonujon kaj Egiptujon, sed pro tio, ke ĝi sukcesis estigi ion tute novan kaj senprecedan. Kaj ankaŭ Esperanto havas la saman ŝancon ! Tamen la trezoro ne kuŝas sure, ĝi kaŝiĝas ene! Ja ĉiuj veraj trezoroj ĉiam kaŝiĝas nur ene !

Notoj:

1/ Edmont Privat: Historio de la lingvo Esperanto, Internacia Esperanto-instituto, Hago, Nederlando.

2/ Fokuso, n-ro 11/1973, E. Vilborg.

3/ Merĝi - mergiĝi; enmerĝi - enmergiĝi, eniri; elmerĝi - elmergiĝi , eliri / anstataŭ emerĝi, kiu estas tipa nenecesa, naturalisma pseŭdoradiko kaj novismo de PIV, nekapabla doni pluajn derivaĵojn/.





# LA KULO

En la mondo estas aferoj agrablaj kaj malpli agrablaj,kiuj valoras nian priatenton. Inter la lastajn apartenas insektoj, kiujn ni nomas ĝenaj, kvankam ili estas al homo speciale aminklinaj. Tian kortuŝan preferon al ni manifestas la kulo, kiu scipovas rafine nin plezurigi dum plej diversaj situacioj.

Sinjoron Kulon mi devus propre ellasi, tiu laŭdire kontentiĝas je la nektaro de la florkalikoj, sed kompense sinjorino Kulino montras precipan ŝaton al la dolĉa sango de mamuloj kaj antaŭ ĉio al tiu,kiu troviĝas sub la mola haŭto homa. Nature, kontraŭ gusto nenia disputo. Sed mi tamen volas ĉi-linie ataki tiun perturbanton de la hejma trankvilo.

Endas antaŭsendi, ke mi loĝas en la centro de regiona urbo, eĉ sur strato distingiĝanta per trafiko kaj bruo de grandurbo,inkluzive la aŭtoelblovaĵan fetoron, kaj oni povus supozi, ke la pulo, tiu ĉi fireprezentanto de la insekta regno, ne vojeraros al ni. Sed erara opinio. Ĝi jam dum pluraj jaroj al ni buntigas la noktoj kaj elserĉadas kun aparta ŝato kaj mistera intuicio nian dormejon, kvankam ni ĉe la malfermita fenestro singarde ne ŝaltas la lumon. Sed kiom naive ĉi tiel kontraŭagi la inteligentecon kaj diablajn supersensojn de la kulino.

Lacigita de la tagpenadoj, lulata de la sonoj de la televidilo aŭ poŝradio oni metiĝas en la plej dolĉan rifuĝejon, en brakumon de sia lito, por ĉerpi en 6 aŭ 7 horoj novajn fortojn por la plua vivbatalo. Fine oni ekdormas, dormas duonhoron aŭ horon, kaj jen aj!, fi!, oni frotas sin sur la frunto, gratas sur la orelo aŭ pojno. Post tempeto novaj pikoj, misaŭgura zumado ĉirkaŭ la orelo jam anoncas:fino de dormado. Plena de indigno pro la orgojla malrespektemo de la vampira kulino, kiun neniom ĝenetas, ke vi devas ĉiutage je la kvara frumatene ellitiĝi, vi saltas el la lito, fermas la apertetan fenestron, eklumigas kaj startas al furioza ĉaso, pli aventura ol tigroĉaso en ĝangalo. La kulo okupis strategian lokon en la plej fora plafonangulo, kie ĝi vian atakon taktike atendas. Vi do prenas la okulvitrojn,alstarigas tableton kaj seĝon kaj armas vin per Hungara Vivo aŭ Heroldo /la estimataj redakcioj ekskuzu ĉi misuzon por tiel sangavida faro/. Vi proksimiĝas ĉirkaŭspekte dum lamentado de la veketiĝanta edzino, kaj jam , jam fulmeca bato estas finonta vian turmenton. Sed tiam vi ne konas pulon. Tiu tutcerte legas viajn pensojn, ekipita per iaspeca telepatia radaro. Sekunderon antaŭe li eskapas. Kien nur ? Vane vi serĉas ĝin en la tuta dormoĉambro. Kun neordinara inĝenio ĝi kaŝiĝas ie, kie ĝin plej akrega okulo ne malkaŝas. Ian tempon vi rondiradas, ŝtreĉas la vidsenson, konsoladas la edzinon. Poste vi kapitulacas, estingas la lumon kaj kun penso diablo prenu la kulon vi ree enlitiĝas. Sed ve,la diablo ĝin ne prenis. Pli vere estas la kulino diabla instrumento kaj post ia tempero ŝi denove kun aminda fajfa zumeto provas la pluan parton de sia vespermanĝo.

Ankoraŭ du- trifoje vi provos likvidi la monstran streketon, sed same sensukcese dum la horoj malesperige kuras al la horo H, kiam la vekhorloĝo eksonoros. En la interĉasaj paŭzoj peliĝas tra la kapo pensoj kaj al la kolero miksiĝas respekto kaj admiro al tiu malgranda kaj malica estaĵo. Malica ja el vidpunkto mia.

Ekpensas mi kiel eble ege ekonomie ĝi mastrumas kun la guteto da sango akirita el mia provizejo. Nu, se ĝi min ne pikadus kaj vekadus, mi volonte donus al ĝi plu oble pli. Kiomfoje ĝi probable svingas siajn flugiletojn dumsekunde ? Hm, laŭ la alta fajfa zumo mi konjektus tonon respondantan al 8 kilocikloj, t.e. 8000 flugilsvingoj en sekundo,se la sono estas tiel produktata. Tio estas jam ia labordono. Aŭ oni pensu

pri tia araneo. Semajnojn ĝi nenion kaptas, malsatas kaj soifas kaj tamen ne pereas. Foje mi observis araneon en somerdomo, kie mi estis vizite. Muŝon mi dum tiu tempo en ĝia reto ne registris. Kelkfoje mi lian araneaĵon difektis - ne pro malico, sed pro esplorpasio - sed ĝi ĉiam la araneaĵon al si perfekte riparis kaj preskaŭ tutan nove ŝpinis. Mian natursciencan sopiron ĝi eble prave konsideris malico. Ĝi reŝpinis. Sed el kia materialo ! Fakulo diros al ni, ke per pli fortika fibro ol estus samdika metala ! Kie ĝi prenas la materialon ? El kio ĝin kreas la malsata aranea korpo? Ho, kiel scipovas mastrumi tiu ĉi instruisto de ekonomio ! Kaj entute kiom da mirakloj estas ĉirkaŭ ni en la enorma multformeco de la naturo, en la plej eta mikroorganismo,viruso, bakterio.

Iam mi legis libron plenan de profundaj pensoj de scinecisto kaj filozofo. Kaj dum mi meditis super la enhavo de la ĉapitro, trans la libropaĝon transkuris eteta orangkolora skarabeto aŭ araneeto, pli eta ol papavero. Venis ideo al mi, ke tiom, kiom scias ĉi tiu estaĵeto pri la libroenhavo, eble samtiom scias la "reĝo de la kreitaro", la homo pri la senco de la homo, vivo, pri la senfineco de la tempo kaj spaco. Kaj tamen eĉ tiu oranĝa kuranta punkto havas sian taskon, havas koron, kiu batas, havas sian sopiron. Per selektado kreas formojn de vivo plej rezistajn kaj akomodiĝemajn al ĉiam novaj kondiĉoj, cirkonstancoj, medioj.

Kaj do en tiu momento mi prenis intencon, ke kontraŭ la ruzula kulo mi devos apliki la armilon de homo: la racion. Jes, mi aĉetos ŝprucvenenon, kiu mortigas kulojn kaj muŝojn, ian antikulin', kulomort'......

Kun tiu konsola farintenco mi tamen ekdormis eble horon antaŭ la neformarĉandebla alvoko de la vekhorloĝo. Versimile eĉ la kulino estis por hodiaŭ jam sata. Kaj se ŝi vere legas miajn pensojn, eble ŝi al ni ne plu revenos.

Jiří Kořínek

NEFORGESEBLA ETOSO EN LANČOV -daŭrigo el paĝo 6.

aŭ kverelon. Kaj babilante per komparo de niaj kutimoj,niaj vivkondiĉoj, opinioj pri ĉio, ni lernis, ni gajnis novajn amikojn kaj - iomete - ni helpis al mondpaco.

Kiu konsentas kun nia mondpaca spirito,kiu estas preta akcepti libervole tendaran disciplinon, kiu helpas faciligi komunan vivon inter tiom da homoj,kiu volas eĉ rezigni dum du semajnoj je sia propra hejma komforto - tiu venu en L A N Č O V !

Sole mi proponas al la SET organizatoroj: plibonigu iomete la orientaciajn ŝildojn, ĉefe en stacidomo en Šumná kaj poste je fino de la vojo.

Mi esperas, ke ni, germanoj el GDR,vizitos Lanĉov iam renove,kiel ni jam faris.Ni deziras al ĉiuj saman gajan, bonan kaj amikan medion,kiel ni havis.

Ĝis la revido en L a n ĉ o v.

Dr. Erich Kalbe kun edzino

DDR 44 B i t t e r f e l d - 4

Kurt - Herzau - Str.n-ro 1

Noto de redakcio :
Foto sur la paĝo 6 prezentas
aŭtoron Dr.Kalbe kun edzino en tendaro Lanĉov.



## KORESPONDI DEZIRAS:

Ni atentigas ĉiujn,kiuj d e z i r a s korespondi, ke de estonta numero de STARTO,tio signifas de numero 6/76,ni publigos sole p a ĝ i t a j n anoncetojn. Por ĉiuj 25 vortoj vi pagos aŭ 15 da ĉeĥoslovakaj kronoj aŭ 5 irpk.Fremdlandanoj povas sendi ankaŭ la egalvaloron,tio signifas: esperantajn insignojn/ 1 peco = 4 Kĉs/,librojn,flagetojn kun esperantaj motivoj,esperantajn glumarkojn/ 1 peco = 1 Kĉs/kaj simile. Sammaniere vi povas mendi la numeron de Starto en kiu estos publikota via anonco.Prezo de unu numero inkluzive postelspezoj estas 5 Kĉs aŭ 2irpk.

Asocio ne respondas por anoncoj, iliaj promesoj kaj plenumado de la anoncetoj.

Bodi Etelka, 22j. studentino, 3300 EGER, Klapka út. 12, Hungario ❋ Géza Bikfalvi, 19j. junulo, H-1116 BUDAPEST, Sopron út. 66 II/51 ❋ Tadeusz Brzezniak, 18j. Machnice-18, 55-114 WISZNIA MATA, Pollando ❋ Sendu gratulleterojn kun korespondproponoj al: USSR, 394693 VORONEĴ-centr, Universitetskaja pl. 1, WGU, komnata 212, FOP, Esperanto-kruĵok /I. Kulakov/ ❋ D-ro Jaroslav Matvijiŝyn, do vostrebovania; 252001 KIEV-1, USSR, kun personoj, kiuj konsentus trarigardi katalogojn de arkivoj kaj manuskriptejoj en siaj urboj por trovi tie materialojn el historio de la scienco, spec. matematiko en Ukrainio. ❋ Lernejanoj 12-17 j. - en ĉiu koverto ili sendas diversaĵojn. Post unu-du jaroj ebleco inviti la koresp. al Taŝkento. Skribu registrite al Romano Grinŝpan, USSR, 700125 TAŜKENTO 125, Visokovoltnij masiv,ul. Sajfulina 4. Enmetu belan bk kaj surgluu belan pm. ❋ Internacia Ligo de Agrikulturistoj-Esperantistoj serĉas peranton por ĈSSR. La volontulo skribu al prez. de ILAE: Ŝ. Kukuŝev, ul. Oboriŝte 15, 4550-PEŜTERA, Bulgario.
Gustavo Emiro Ochoa Henao, SANTA FE DE ANTIOQUIA, Kolombio, Sudameriko.

F-ino Emilia Wojtakowska, P.O.Kesto 312 PL 50-950 WROCLAW 2, Pollando. /interŝ.Esp.revuojn kaj librojn/ ● Ryszard Cieŝlik, 23 j. oficisto, 59-414 DOBROMIERZ, str. Kościelna 1-a, Pollando ● Du rondoj -kun kolektantoj de p.m., b.k., E.libroj Diamentova 6, 80-028 GDAŃSK kaj Słaska 66 B 80-389 GDAŃSK, Pollando ● S-ino M.Buckle, Hill Crest,53 Svuth Street, Barming, Maidstone, Kent, ME 16 GEX, BRITIO / por siaj gelernantoj/ ● Adresŝanĝo: Jos.V.Otta, Uničovská 26, 787 01 Šumperk - ĈSSR ● Sebík Anikó, 14 j. Karcsag, Ády E.út.2, HUNGARIO ● Stáňa Weisserová, 24 j. Bělý 36, 549 63 Machov, okr. Náchod ● Felipe Calle 23 No.1613 apt. 31 e/ 28 y 30 Vedado HAVANO 4, Cuba /Kubo/ ● S-ro Mac Blondel, 22 rue C.Debussy, 591 30, Lambersart, FRANCIO ● Vádocz Erzsébet, 1144 Budapest, Gvadányi 32-34 I.23, HUNGARIO ● Pavlenko Sergej, 455023 g. Magnitogorsk 28-110, USSR o Zaĥarova Olga, 30j.ingeriinino, 300 000 Tula-centr, prospekt Lenina, d.31, Glavpočtamt, abon. jaŝĉik 21, USSR ● Anna Vojnaroviĉ, 343 871, Avdejevka-3,Doneckoj obl. UKRAINA SSR ● Bariŝnikova Elena, Uljanovskaja reg.,Dimitrovgrad- 4, Stroitelej 24-3, USSR ● Por komencantoj 18-19 jaraj serĉas korespondamikojn Ernesto Schlesinger, P.O.Box 35, 3400 Cluy-Napoca,RUMANIO ● Adresŝanĝo: Eli U r b a n o v á, R2/510, Bohnice III- Troja, Praha 8, ĈSSR.




SINCERAJN SALUTOJN AL LA LEGANTOJ DE STARTO SENDAS EL ATENO, LA LOKO DE LA 61-a UNIVERSALA KONGRESO,LA PREZIDANTO DE Ĉ E A JOSEF VÍTEK. PRIKONGRESA RAPORTO SEKVOS EN VENONTA NUMERO, KIU APEROS KOMENCE DE LA DECEMBRO.

# INFORMACE SEKRETARIÁTU ČES

Blíží se období, kdy vás navštíví pokladní vašich místních skupin anebo obdržíte složenku, pokud nejste členy žádné naší základní organizace. Prosíme, abyste vyrovnali svoji členskou povinnost ihned. Zajistíte tak pro vaši skupinu 10% částku z odvedených příspěvku pro potřebu na vlastní výdaje. Navíc tak zajistíte svazu prostředky na další tiskoviny a činnost v roce 1977. Při této příležitosti vás informujeme o novém příspěvkovém řádu, schváleném II.sjezdem našeho svazu. Všichni členové kategorie A,B,C a F budou dostávat zdarma Panoramo.

| | | | |
|---|---|---|---|
| kat. A | příjem 1.000 Kčs a výše ....... | roční příspěvek | .....60.-Kčs |
| kat. B | příjem do 1.000.-Kčs ....... | -"- | .....30.-Kčs |
| kat. C | podporující členové ....... | minim. -"- | ....100.-Kčs |
| kat. D | rodinní příslušníci nad 15 let | -"- | .... 15.-Kčs |
| kat. E | příznivci esp.svazu - " - | -"- | .... 15.-Kčs |
| kat. F | doživotní členství /jednorázový příspěvek/ | minim. -"- | ... 600.-Kčs |

ANONCOJ EN STARTO de la estonta numero ni publikos sole, se vi sendos 15.-Kčs /ĝis la 25 vortoj/ al 4 irpk. Asocio ne respondas pri la enhavo de anoncetoj eĉ pri eventuala plenumado de proponoj aŭ promesoj.

Zájemci o esperantský překlad závěrečného dokumentu z Helsink 1975, který jsme ve spolupráci se Svazem slovenských esperantistů pro vás zajistili - FINA AKTO- jej mohou dostat proti zaslání známek v hodnotě 2.-Kčs na náklady spojené s poštovným a expedicí. Brožura je zdarma.

LETOS vyjde na 80 stranách dvojčíslí "PANORAMO",výběr z děl našeho předního básníka sam. Kořínka. Bude to ojedinělý výběr jeho básní i překladů. Pokud jste si ještě neobjednali tuto knížku, učiňte tak co nejdříve. Bude vydána v omezeném nákladu 1.000 ks. Cena za tuto publikaci je stanovena na 16.-Kčs. Nezapomeňte na vánoce, knížka bude pro vaše přátele vzácným dárkem.

Ústřední výbor našeho svazu připravuje pro všechny naše členy i MS zajímavou soutěž k příležitosti 90.výročí vzniku esperanta a 60.výročí úmrtí L.L. Zamenhofa. Můžete získat jednu z řady cen. Informujte se u vedoucích svých MS. V příštím čísle Starta uvedeme podrobnosti.

Připravujeme serii informací pro širší neesperantskou veřejnost v hromadných sdělovacích prostředcích. Aby tyto hromadné sdělovací prostředky měly zájem na dalších zveřejněních, je třeba vhodně reagovat dopisy. Upozornujte svoje známé a pište. Sledujte vysílání televizní redakce Jizerka. Počítá se v nejbližší době i tam s programem o esperantu. Vaše dopisy podnikům, které u nás inzerují, mohou rovněž pomoci při další inzerci. Někdy stačí jenom krátká zmínka, uznání,poděkování. Inzerce podniků je velkou finanční pomocí svazu.

PRO VÁS I VAŠE ZAHRANIČNÍ PŘÁTELE MÁME PŘIPRAVENY :

Propagační samolepky: Esperanto parolata - larch ...3.-Kčs, Per esperanto por mondpaco - 1 arch ...5.-Kčs, Esperanto Vás spojí s celým světem - 1 arch ... 6.-Kčs.

Odznaky: svazový /2 druhy/ po 7.-Kčs, MEM - 6.-Kčs, šachistický -7.-Kčs, odznak sběratelů esper. odznaků - 7.-Kčs, Lančov - 6.-Kčs, odznak jubilejní MS Mělník - 7.-Kčs /novinka/, odznak hvězda v bílém poli /kruhový/ ⌀ 6 mm - 5.-Kčs a mnoho dalších.

Z knih si můžete opět objednat:

Ŝercoj rakontoj - 5.-Kčs, Ridu per Esperanto - 15.-Kčs, Sep reĝidoj - 24.-Kčs, Učebnice esperanta pro děti /1 díl/ - 20.-Kčs, Sklavoj de Dio - 50.-Kčs, Panoramo /dva díly/ po 8.-Kčs, Ora duopo - 17.-Kčs,Komenio



kaj internacia lingvo - 4.-Kčs, Paŝoj al plena posedo -19.-Kčs,La perdita vizaĝo -15.-Kčs, Apokrifoj - 12.-Kčs, Silezia j kantoj - 11.- Kčs, Okupacio - 8.-Kčs, Tallin -atlaso /novaĵo/ -16.-Kčs, Franca arto -1 ks 3.-Kčs, Pri la varmo - 21.-Kčs, Poŝatlaso - 20.-Kčs, dále pak dopisní papíry, vánoční blahopřání, zpěvníky. Již koncem září budou na skladě v dostatečném množství Cvičebnice esperanta od T.Kiliána -18.50.- Kčs, Cvičebnice od J. Cinka -15.-Kčs a slovník od.R.Hromady Česko-esperantský a esperantsko - český - 14.50 Kčs.

DVĚ VYZNAMNÉ DOHODY MAJI BÝT PODEPSÁNY JEŠTĚ V TOMTO ROCE ! !

Jednou z nich je " Smlouva mezi Českým esperantským svazem a Svazem Československých filatelistů o vzájemné spolupráci " Má přinést mnoho zajímavého a užitečného do až dosud neoficielních styků mezi oběma svazy. Předpokládá se, že by tato dohoda byla podepsána na podzimní " Mezinárodní výstavě poštovních známek Ostrava 76 ".

Druhou má být družební dohoda o spulupráci mezi Českým esperantským svazem a Ústředím svazu esperantistů DDR. Byla by to prvá smlouva tohoto druhu, kterou by uzavřel náš svaz. Dle dlouhodobého plánu činnosti se počítá s navázáním jednání o uzavření podobných smluv mezi ČES a PLR,MLR případně BLR.

Podepsání dohody mezi námi a NDR nyní zcela odvisí na druhé straně,na jejich urychleném vypracování a zaslání připomínek k našemu návrhu .

Český esperantský svaz zakoupil a věnoval broušenou vázu jako cenu pro Mezinárodní výstavu poštovních známek " Ostrava 76 ".Cena je určena a bude předána nejlepší námětové sbírce na téma ESPERANTO,která bude na jmenované expozici vystavena .

Televidila redakcio " JIZERKA" interesiĝas prepari en proksima estonteco cca 10 minutan programon pri Esperanto kaj ĈEA.Skribu amase al redakcio, plirapidigi la preparojn !

En lastaj semajnoj vi povis legi en plejgrandaj kaj plejamasaj gazetoj " RUDÉ PRÁVO" kaj "ZEMĚDĚLSKÉ NOVINY" interesajn artikolojn pri la interlingvistiko kaj Esperanto. Reagu amase al notitaj redakcioj kaj petu de ili pli da informoj. Aŭtoro de ambaŭ artikoloj estis redaktoro de STARTO, samideano Oldřich Knichal.

Ve dnech 14.-17.10 1976 bude uspořádán v Mělníku již třetí seminář pro funkcionáře svazu,vedoucí sekcí a komisí,vedoucí a funcionáře ÚKRK a základních organizací svazu. Seminář bude věnován tématu : Úkoly svazu po XV. sjezdu KSČ a II. sjezdu ČES.

Sekretariát ČES získal další místnost vedle dosavadní úřadovny v Jilské 10, Praha 1.Jde o garáž,která sousedí se sekretariátem.Bude re - konstruována na knihovnu a reprezentační místnost svazu. Budeme po - třebovat pomoc dobrovolných brigádníků,kterým uhradíme pobyt stravování a cestovné do Prahy a zpět.Máme zájem hlavně o tyto profese a pomoc : zedníky,tesaře, truhláře, lakýrníky, istaletéry vody a elektroinstalací, zámečníky a aranžéra. Zároveň prosíme, pokud je mezi námi bytový architekt, aby pomohl svým návrhem. Vaše předběžné nabídky jsou vítány. Zároveň prosíme vedoucí pracovníky, kteří by mohli na fakturu nechat zhotovit některé truhlářské práce/ netypické- hlavně pak čelní výlohu/ ať nám dají vědět.

POMOZTE VYBUDOVAT DŮSTOJNÉ CENTRUM ESPERANTSKÉHO HNUTÍ V NAŠÍ VLASTI!

ZNOVU - ZNOVU - ZNOVU - ZNOVU - ZNOVU - ZNOVU - ZNOVU - ZNOVU - ZNOVU

xmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmx

UPOZORŇUJEME na možnost dobrého výdělku přihlásíte-li se a zajistíte-li placené inzety od n.podniků, organizací,rekreačních zařízení,turistických kanceláří, zahraničních zastupitelství a pod.do našeho časopisu STARTO.Již objednávka a zaplacení jednoho inzertu ve 2 barvách vám poskytuje odměnu min. ve výši 500,- Kčs brutto !! Nabídky a informace pro další jednání zašleme !! Neváhejte!! I ve vašem podniku je tato možnost !!



## PODĚBRADY V RETROSPEKTIVĚ



Ve dnech 11. - 13.6.1976 připravil náš svaz seminář pro začínající esperantisty -žáky písemných kurzů v PODĚBRADECH.
Cílem semináře bylo seznámit účastníky s esperantským hnutím u nás i ve světě,seznámit je s posláním našeho svazu s vedoucími představiteli a funkcionáři svazu a v neposlední řadě jim umožnit se poprvé sejít a pohovořit si s učiteli písemných kurzů s nimiž si až dosud jenom dopisovali.



Akce dobře zapadala do kulturně-politické výchovy,kterou svaz a ministerstvo kultury působí na členskou základnu.V příjemné a kamarádské atmosfeře jsme prožili dva krásné dny k nimž bezesporu velkým podílem přispěl večer hudby a poezie připravený naší základní organizací v Poděbradech. Na večeru dominoval známý tenorista ND a přítel esperantského hnutí M.Frydlevič s překrásnými áriemi jak v češtině tak v esperantu.
Položili jsme kytici k pomníku S.K.Neumanna,rodáka z Poděbrad a jednoho ze zakladatelů esperantského hnutí u nás . Nedělní odpoledne bylo věnováno výletu lodí do blízkého Osečku.Lze si jenom přát, aby z tohoto pokusu se stala tradice.

/ kýz/




Pohled do sálu při slavnostním zahájení

Muž s největšími starostmi během semináře byl bezesporu P.Polnický,tajemník MS Poděbrady . Má zásadní podíl na zdárném průběhu semináře a spokojenosti přítomných/-dík i porozumění jeho manželky !/.



Přijetí u místopředsedy MěstNV Poděbrady



**TĚSNĚ PŘED UZÁVĚRKOU JSME DOSTALI ZPRÁVU ZE 61.UK V ATHÉNÁCH,**

že byl po dosti vzrušené debatě přijat za řádného člena UEA nám velice blízký Zväz esperantistov S S R a Ústředí esperantistů v N D R / Centra Laborrondo de Esperanto en Kulturligo de GDR / ! ! !

Srdečně oběma svazům blahopřejeme a těšíme se ze skutečnosti,že ve výboru U E A· budou zasedat další 2 delegáti socialistických zemí .

V ROCE 1 9 7 8 uspořádá Bulharský esperantský svaz 63.Všesvětový kongres esperantistů ve Varně. Český esperantský svaz předpokládá na tuto akci značný zájem našich členů.Naše turistická komise byla pověřena projednat s bulharskou stranou podmínky hromadné výpravy z CSSR, pravděpodobně vlakem a zorganizovat " Vlak družby" na tento kongres. Je pravděpodobné, že v součinnosti s naší sekcí železničářů se podaří vypravit zvláštní vlak, který by sestával ze souprav z NDR, ČSSR a MLR.

Vaše předběžné objednávky posílejte na adresu vedoucího turistické komise s. Libora K ř i v á n k a, Zborovská 1332, P í s e k .

Předpokládáme, že vaše účast a důstojná reprezentace na 63. UK UEA jasně potvrdí, že esperanto a esperantské hnutí je ve středu zájmu naší společnosti.Kongresy,pořádané socialistickými zeměmi,byly vždy navštěvované nejpočetněji.

Polský esperantský svaz uspořádá ve dnech 15.-17.10.1976 svůj kongres. Zájemci o účast na tomto významném setkání ať se obrací s dotazy přímo na jmenovaný svaz. Adresa : Polský esperantský svaz ul. Jasná č. 6 , Varšava.

REKORDNÍ POČET ÚČASTNÍKŮ obou kurzů Letního esperantského tábora v LANČOVĚ byl zaznamenán v letošním roce. V prvém běhu se ho zůčastnilo na 150 osob v druhém přes 130 osob. A to nemluvíme o mimořádném čtrnáctidenním kurzu pro pionýry, jehož se rovněž zůčastnilo přes 100 dětí. Lančov se stává pojmem a to nejen v ČSSR , ale i v zahraničí.

Ĉeĥa Esperanto asocio traktis kun la Živnobanka en Praha eblecon pagi la restadkotizojn en Lančov/ de la jaro 1977 / tra la landaj bankoj en la monoj de la interesuloj.Oni sajnas, ke finos la problemoj kun la [illegible] la pagado. Detalajn informojn vi ricevos en la SETAĴO por la jaro 1977. NEFORGESU, ke jaro 1977 estos jubilea jaro, kiam SET festos jam 25 jarojn de la fondiĝo. Mendu la restadon jam nun kajvi ricevos pli malmulte kostan restadon !!! Adreso estas sama : ESPERANTO KLUBO, TŘEBÍČ, ČSSR-aŭ rekte je la adreso de asocio !

Ze Sovětského svazu přišla zpráva, že Komise pro mezinárodní styky esperantistů SSSR zamýšlí pozvat účastníky IX.konsultativního setkání esperantských svazů socialistických zemí do MOSKVY na závěr tohoto roku. Byl by to další důkaz jak vedoucí země socialistického společentsví se vážně zabývá interlingvistickými problémy a esperantským hnutím. Bližší informace vám přineseme v příštím čísle STARTA .

STARTO : Tiskový orgán Českého esperantského svazu,Jilská 10,Praha 1
Vychází 6x ročně včetně příloh: Medicínské informace a kulturního almanachu PANORAMO. Redakční rada: Oldřich Knichal, ing. František Sviták,PhDr Jaromír Jermář CSc,Jar. Mařík.
Grafická spolupráce : Jaroslav Klement.Fotografoval:Z.Křimský. Vytiskl : Podnik služeb okresu Mělník,tiskárna Neratovice. Předáno do tisku dne 23.8. 1 9 7 6.



STAVIVA

národní podnik; krajský závod
Brno, tř. Obránců míru 4
dodává stavebniny podnikům
socialistického sektoru
i soukromým spotřebitelům.

STAVIVA

nacia entrepreno; regiona negocejo
Brno, tř. Obránců míru 4
liveras konstrumaterialojn
al la entreprenoj de socialisma sektoro
kaj ankaŭ al privataj konsumantoj.

STAVIVA



# Ĉu vi volas esti plene informitaj pri E-movado en SSR?

## ESPERANTISTO SLOVAKA

estas ĉitie eĉ por vi !
havas 16 paĝojn da teksto !
aperas regule kvinfoje jare !
estas plena de informoj, rakontoj, krucenigmoj, poemoj, kantoj kaj literaturo !

## Mendu pruvnumeron !

**Abonu ĉe:**

D-ro Ludoviko I Z Á K,
Vilao E S P E R A N T O
Rastislav-strato 13,
036 01 M A R T I N

POR BONA RIKOLTO NIAJ ĜARDENSTERKOJ



výrazně zvyšuje výnosy jahodníkových kultur

**POR KUKUMOJ**

*na okurky a rajčata*

# *cucumin*

**KAJ TOMATOJ**



plnohodnotné hnojivo pro efektivní pěstování cibule, česneku, póru a pažitky

**POR FRAGOJ**

*na jahody*

# *fragarin*



speciální hnojivo pro zajištění úrody okurek, melounů, rajčat a papriky

**POR CEPO**

*na cibuli a česnek*

# *allin*

**KAJ AJLO**

**LACHEMA n. p. BRNO**
**závod 6 Neratovice**

**VYRÁBÍ**
**FABRIKAS**

LA
CHE
MA